

# La Riveredo

Raporto de la prezidanto	2	Nitobe-simpozio 2013	19
Tero de Espero	3	Premio Deguĉi por Lernu	20
Ĝi komenciĝas ĉe NASK	11	<i>La Universala Lingvo</i>	21
Post-NASK-a kongreso	13	Bonan festoon, Tamara	22
Mia dua UK	15	Kalendaro	23-24



La Tero de Espero  
*La terre d'espérance*



# Raporto de la prezidanto



*La célébration réussie du 30<sup>e</sup> anniversaire de la SQE, le livre sur l'histoire de notre société, quatre interviews à Radio-Canada International, une page dans Le Devoir, réunion annuelle de l'ESF à Montréal... Voici les événements principaux de l'année 2012, selon le rapport annuel du président de la SQE, Normand Fleury*

Oni povus pensi, ke malmulto okazis en la kebekia Esperantio dum la pasinta jaro. Fakte, eĉ mi pensis tion antaŭ ol verki mian raporton. Estas tendenco esti pesimista, kaj ni devus klopodi vidi kaj memori nur la pozitivan flankon en la vivo.

Nu, la festo por la 30-jariĝo de ESK estis grandega sukceso, kun partopreno de 42 personoj (eĉ el Usono). Ni preskaŭ finvendis la 50 ekzemplerojn de la libro « 30 jaroj da agado » : bela libro kun multaj informoj.

La tri klubaj etnaj vesperoj kun manĝoj estis ankaŭ sukcesaj, nome la japana, brita kaj usona vesperoj.

Aperis tutpaĝa artikolo pri la 125-jariĝo de Esperanto en *Le Devoir* kaj sekvis kvar intervjuoj en la franca, angla, hispana kaj ĉina en Radio Kanada Internacia.

MEKARO en Otavo estis ne nur plene sukcesa, sed ankaŭ la plej granda ĝis nun, kun 49 partoprenantoj. Ni jam havas planon pri ĝi por la venontaj 5 jaroj.



Esperantic Studies Foundation kunvenis en Montrealo, kaj okazis vespero kun la membroj de ESK.

Fine, kaj ne malpli grave, *La Riverego* eldoniĝis regule sub la profesia zorgado de Ĵenja Amis.

Mi do povas konkludi, ke ni havis sukcesan jaron. Certe, ĉiam eblas fari pli, esperi pli, sed ĉio dependas de la kunlaboro kaj laborforto de volontuloj. Dankon kaj longan vivon al ESK.

*Normando Fleury, Prezidanto de ESK*



# La Tero de Espero

*Ĵenja Amis*

*La redaktro de La Riverigo deĉris ŝa deĉkoverte de Terre d'espérance — la plus importante exposition d'art horticole au monde, prête à éblouir le public par des œuvres à couper le souffle !*

**Ĉi-jare, ekde junio ĝis septembro, la montreala botanika ĝardeno gastigis eble la plej gravan tutmondan hortikulturajn eventojn de la jaro : la ekspozicion « La Tero de Espero ». Same kiel la nomo indikas, la celo de la evento estas ne nur mirigi la vizitantojn, sed ankaŭ konsciigi ilin pri la graveco de la konservado de la naturo kaj la riĉeco de la vivo sur la Tero.**

Dum la unuaj tri monatoj de la ekspozicio duonmiliono da homoj vidis tiujn gigantajn verdajn majstroverkojn. Esperiga, profunda, kortuŝa... mankas vortoj por esprimi ĉion, kion oni pensas vidante jen la ĉarmajn kurantajn

florĉevalojn, jen la majestajn patrinon-terojn tenantajn akvofalonojn, el kiu aperas ora aglo. Kiam vi legos tion ĉi, la ekspozicio jam estos finita. Efemeraj, kiel la floroj mem, la skulptaĵoj estos malmuntitaj, sed en la koroj de tiuj, kiuj bonŝancis vidi ilin, por ĉiam restos memoroj kaj la sento de granda admiro antaŭ ties artistoj kaj centoj da volontuloj, kiuj sindediĉe prizorgis la skulptaĵojn : tute laŭlitere, sur tero, aero kaj en akvo ! Mi sentas min tre bonŝanca esti vidinta tiun eventon, kiu okazas nur unufoje en ĉiuj tri jaroj en diversaj urboj, kaj mi sentas, ke mi vidis ion, kio estis pli granda ol vivo : mi kvazaŭ rigardis en la animon de la animo de la naturo !





## Fidela Haĉiko

Inter ĉiuj aliaj skulptaĵoj tiu ĉi eble ne estas la plej impresa, plej bela aŭ plej granda — sed ial ĝuste apud ĝi vi vidas plej multajn infanojn. Eble ili estas altiritaj de iu magnetismo, kiu elradias el tiu ĉi planta hundo, kun rigardo fiksita al la horizonto, kiu streĉite kuŝas sur la ligna planko apud la flor-reloj kaj la ŝildo « Trajnstacio Ŝibuja ». Tiu skulptaĵo venis el Japanio, kie multaj homoj konas la rakonton de la Fidela Haĉiko. En 1924 Hidesaburoo Ueno, profesoro pri agrikulturo de Tokia Universitato, prenis brunetan hundon de speco *akita* al sia hejmo. La hundo ĉiutage iradis kun la profesoro ĝis la tokia stacidomo Ŝibuja, kaj posttagmeze Haĉiko revenis tien por renkonti sian mastron. Unu tagon la profesoro ne revenis al la stacio... La hundo fidele atendis lin, sed li ne venis,

nek la sekvan nek la postsekvajn tagon. Fakte, li ne revenis iam ajn, ĉar la profesoro mortis, dum li estis en sia laborejo. Tiutempe la fidela hundo havis nur 18 monatojn, sed dum la resto de sia vivo, dum longaj naŭ jaroj, la hundo revenadis ĉiutage, je la sama horo, esperante denove renkonti sian mastron. Tiu ĉi hundo por multaj homoj fariĝis la simbolo de lojaleco : la stacidomon Ŝibuja ornamas statuo de la hundo kaj estas kelkaj filmoj pri Fidela Haĉiko.

## Packolombo el Hiroŝimo

Alia kortuŝa skulptaĵo el Japanio estis prezentita de la urbo Hiroŝimo : la packolombo, kiun formas kunplektitaj manoj. Montrealo kaj Hiroŝimo, fakte, estas ĝemel-urboj, kaj ĉiujare la 5-an de aŭgusto



(6-an laŭ hiroŝima tempo : la tago, kiam la urbo estis bombita) en Montrealo okazas ceremonio por honori la viktimojn de la atombombado. La packolombo estas tre speciala por la urbo Hiroŝimo : ĉiujare la 6-an de aŭgusto en Hiroŝimo mem la urbestro de Hiroŝimo legas la deklaron pri la paco kaj liberigas mil packolombojn, tiel portante la mesaĝon pri la paco al la ĉielo. « Per bildigo de la kolombo kiel simbolo de la paco per la manoj, kiuj aperas el la tero, ni volas porti nian sinceran deziron por ke la tuta mondo vivu pace, kaj ke ni ĉiuj homoj helpu unu la alian malgraŭ la naciaj kaj kulturaj diferencoj », skribis la aŭtoroj de la verko en ĝia priskribo. La teksto ankaŭ memorigas, ke du proksimaj parencoj de la kolombida familio, la dodo kaj rodrigesa ermitkolombo, malaperis de Madagaskaro kelkajn jardekojn post la alveno de eŭropaj koloniantoj...



## La knabino kun gruoj

La skulptaĵo « Vera Rakonto » venis de Ŝanhajo. Ĝi prezentas belan gracion junulinon, ĉirkaŭitan de

gruoj kaj tenantan grupon en la manoj. Same ŝia historio estas vera, poezieca kaj... trista. Ĝi okazis en la malfruaj 1980-aj jaroj. Xu Xiujian, knabino de norda Ĉinio, ekde sia infanaĝo amis la japanajn grupojn (oni nomas ilin « ruĝvertaj grupoj », ĉar ili havas ruĝan

« verdon » [kapsupron]). Kiam ŝi finis la universitaton, ŝi decidis iri labori en tre fora naturrezervejo, por prizorgi la ruĝvertajn grupojn. Unu tagon ŝi provis savi vunditan grupon, kaj falis en la marĉon. La grupo saviĝis, sed la knabino, bedaŭrinde, ne... La ruĝvertaj grupoj estas



minacata specio, kiu loĝas en Japanio, Ĉinio, Koreio, Mongolio kaj kelkaj partoj de Rusio. Oni konas ilin pro la ĉiuprintempa unika « geedziĝa » baledo, kiam la potencialaj partneraj grupoj kombinas saltojn, riverencojn kaj movojn de la flugiloj en plena harmonio.

## La patrino-tero

La majstroverko « Patrino-Tero » sendube venkis la korojn de ĉiuj vizitantoj. Oni konas ŝin per multaj nomoj : la sud-amerikaj indiĝenoj nomas ŝin « Paĉamama ». La Grekoj nomis ŝin « *Gaia* », kaj la Romianoj — « *Terra Mater* ». Oni konas ŝin kiel « *Mahimata* » en Rigvedo, kaj la nordiaj eŭropanoj konis ŝin tra generacioj kiel « *Eorban Modor* ». Universala, ŝi preterpasas la naciecojn kaj epokojn. Ŝi estas la bazo de ĉio : ĉiuj plantoj,



mineraloj, manĝaĵoj... ĉiu aĵo devenas el ŝi. Ĝi kvazaŭ estas enkorpiĝo de la nomo de la ekspozicio mem : « La Tero de Espero ».

Tiu ĉi unika kreaĵo estas inspirita de parolado atribuita al fama indiana ĉefo, nomata Seatlo, en 1854 : « Ni estas parto de la Tero, kaj ĝi estas parto de ni... La parfumitaj floroj estas niaj fratinoj ; la cervo, la ĉevalo, la granda aglo — ili estas niaj fratoj... La rokaj montoĉenoj, la sukaj de la valoj, la korpovarmeco de ĉevaloj, la homo — ĉio apartenas al unu familio... La brilanta akvo, kiu kuras en la riveroj kaj la riveretoj, ne estas simple akvo — ĝi estas la sango de niaj prauloj... La akvosusurado estas la voĉo de la patro de mia patro... La aero estas trezoro por la ruĝa homo, ĉiuj bestoj dividas la saman spiron ; la besto, la arbo, la homo — ĉiuj dividas la saman spiron... Kio

estas la homo sen la bestoj ? Se ili ĉiuj malaperos, la homo mortos pro granda spirita soleco. Ĉio, kio okazas al la besto, baldaŭ okazos al la homo... La blanka homo devas trakti la bestojn de tiu ĉi tero kiel siajn fratojn... Konservu la memoron de tiu ĉi Tero tia, kia ni donas ĝin al vi. Kaj per ĉiuj viaj fortoj, via spirito kaj via koro, konservu ĝin por viaj infanoj kaj amu ĝin same, kiel Dio amas nin ĉiujn ! »

La patrino-teroj majeste aperas de la tero kaj ne povas illustri tiujn ĉi vortojn pli bone. Ŝia korpo estas preskaŭ 15 metrojn alta, kaj el ĝi aperas la montoj — kiuj estas ankaŭ ŝiaj haroj. Per unu mano ŝi metas cervon sur florplenan valeton, kie paŝtiĝas ĉevaloj kaj bizono (jen la rememorigo, ke la bizonoj unufoje jam preskaŭ malaperis, sed la homa



interveno malhelpis tion). De ŝia alia mano fluas akvofalo, el kiu aperas ora aglo : same kiel bizonoj, preskaŭ malaperinta specio, kiun la lastatempa homa interveno savis de plena malapero. La homo, la tero, la bestoj... tiu ĉi verko reprezentas la tutan belecon kaj diversecon de nia mondo kaj la unuecon de la homo kaj la naturo !

### **La viro, kiu plantis arbojn**

Li havas kamparanan ĉapon, longan mantelon kaj pufajn lipharojn. Li rigardas la teron. Apud li paŝtiĝas ŝafoj, gardataj de iom komika hareca

ŝafhundo, kiu ŝajnas esti surprizita de la tro multaj preterpasantoj. Jen li, la viro, kiu plantas arbojn : alia majstroverko de la ekspozicio. Lia nomo estas Elzéard Bouffier kaj li estas heroo de libro de la franca



verkisto Jean Giono, kiu siavice inspiris reĝisoron Frédéric Back krei la desegnofilmon kun la sama titolo, « La viro, kiu plantis arbojn », kaj kiu gajnis kvardek da premioj, inkluzive de Oskaro en 1987. Fakte, s-ro Back eĉ mem partoprenis en la kreado de tiu ĉi skulptaĵo ! Laŭ la rakonto, Elzéard Bouffier estis ŝafisto, kiu plantis arbojn por verdigi sian aridan hejmon en suda Francio. La homo povas ne nur ekspluati la teron — la homo povas mem fari ĝardenon eĉ en la mezo de dezerto, diras tiu ĉi verko. La ĉevaloj galopantaj malantaŭe kaj la kapro trinkanta akvon same simbolas, ke eĉ unusola individuo povas ŝanĝi la mondon — kiel faris la viro, kiu plantis arbojn. Ja lia agado preterpasas la limojn de sia naskiĝloko kaj disvastiĝas tra la tuta tero, kiel lia flora mantelo. Ĉu ne kiel Esperanto ?..



## La Birda Arbo

La planado kaj la konstruado de La Birda Arbo daŭris ses jarojn, kaj la laborantoj eĉ devis kompletigi montgrimpajn kursojn por povi labori pri ĝi ! La skulptaĵo estas ege granda : 16 metrojn alta kaj 18 metrojn diametre, sed tamen tre aereca kaj aspekte leĝera. Oni uzis aluminion por malgrandigi la pezon de la skulptaĵo, sed eĉ kun tio la plej peza birdo pezas tri tunojn, kaj la tuta skulptaĵo — 100 tunojn ! La priskribon de la Birda Arbo malfermas la citaĵo de fama kanada sciencisto, Hubert Reeves : « Hodiaŭ ni malaperigas miloble pli da specioj ol antaŭ la industria epoko. Tiu ĉi masakro, jam la sesa dum la historio de la Tero, estas kaŭzita de la homaro. Kaj la homaro povus iĝi ankaŭ ĝia viktimo. » La skulptaĵo estas emblema por tiu ĉi ekspozicio kaj tuŝas la temon





de la malaperantaj specioj sur la Tero kaj la delikatecon de la ekosistemo. La branĉoj de la birda arbo reprezentas 56 speciojn de birdoj, dum la radikoj transformiĝas en diversajn akvajn bestojn kaj en kakapon — « la strigan papagon » —, la solan papagon, kiu ne povas flugi. Tiuj ĉi birdoj kaj akvaj bestoj estas inter la plej endanĝerigataj specioj de la Tero. La birdoj sur la arbo kvazaŭe provas eskapi sian malaperon — la sorton, kiu jam trafis multajn aliajn speciojn... Ni devas malpermesi al ili malaperi... je kiu ajn kosto, estas la mesaĝo de la artistoj.

### **Se ili nur povus paroli...**

La gastiganto de la evento, Kanado, prezentis plej multajn artaĵojn : ne eblis maltrafi etajn ĉarmajn kanadajn naciajn bestetojn kaj bestegojn :

sciurojn, kastorojn, alkojn, lupojn, faritajn el ligno kaj musko, kiuj venis de malvarma norda Kebekio. En la lertaj etaj manoj de elementlernejaj artistoj (la skulptaĵoj estis faritaj de infanoj, sub la gvido de genia artisto kaj instruistoj), la rigidaj materialoj kvazaŭ spiras la vivon kaj la moviĝon ! De la kanada nordo oni iras al la tropikaj ĝangaloj de Malajzio, kies ludemaj plantaj orangutanoj salutas vin de sur la arbo, kaj ties proksima Tajlando, kiu prezentis la vivograndan statuon de sovaĝa akvobubalo : en la mondo restas nur ĉ. 4000 da ili... Apudas la du ludantaj gigantaj pandoj, « Ambasadoroj de Espero », kies nombro, eĉ se malgranda (ĉ. 1600), tamen kreskas.

Tiaj estis la skulptaĵoj : iuj seriozaj, iuj misteraj, iuj amuzaj, iuj ludemaj... kaj ĉiuj, senescepte, kun



profunda mesaĝo ! Jen delikataj ranoj, prezentitaj de Atlanto : kiam oni pensas pri endanĝerigataj specioj, la homoj ofte pensas pri ĉarmaj pandoj aŭ polusaj ursoj kaj ofte ne konsicas, ke el preskaŭ 5000 specioj de ranoj en la mondo ĉ. 2000 estas endanĝerigataj... Jen la « Salamandro » de Gaudi farita el... pomoj ! Salamandro estas tre populara temo en Katalunio kaj simbolas la diversecon de Katalunio mem : ĝiaj loĝantoj, personeco kaj pejzaĝoj. Jen la Gardantoj de la Tero de la Paska Insulo, Ĉilio : silentaj kaj solenaj, ili kvazaŭe reprezentas la tragikan historion de la insulo, kie la senarbigo kaj troa ekspluatado de la naturrimedoj kaŭzis ekologian katastrofon eĉ antaŭ la alveno de la eŭropaj koloniantoj... kies alveno, plue, kaŭzis la preskaŭ tutan malaperon de la loka loĝantaro.

Se la statuoj nur povus paroli !

## Avo Frosto respondas en Esperanto jam pli ol 10 jarojn !

La infanoj de ĉiuj aĝoj — sendu al li manskribitajn leterojn al la adreso :



### Kial Avo Frosto respondas en Esperanto ?

En 2001, la Esperanto-Societo Kebekia traktis kun la Kanada Poŝta Servo proponante la uzon de Esperanto por komuniki kun la esperantlingvaj infanoj de la mondo. La Kanada Poŝta Servo jesis al la propono de ESK, kaj ekde Kristnasko 2002, Esperanto troviĝas inter la korespondaj lingvoj (pli ol 30 !) uzataj de Avo Frosto kaj de liaj helpantoj, la volontuloj de la Kanada Poŝta Servo por subteni alfabetigon.



# Vojaĝo, kiu komenciĝas ĉe NASK

*Minjo Renaud*

*Un voyage qui commence à NASK — cours d'espéranto ayant lieu chaque été aux États-Unis. Participer à ce cours, à l'Université William Peace, n'était qu'un prétexte pour faire du tourisme en Caroline du Nord. Cependant, dès le premier jour, je me suis aperçue que ce n'étaient point des vacances. L'étude de l'espéranto fut jalonnée d'aventures qui ont éveillé ma propre motivation. Et c'est ainsi qu'aujourd'hui j'ai dépassé le stade de l'éternelle débutante...*

Kiam mi planis iri al [NASK](#) ĉi-somere, unue mi vidis en la mapo Nord-Karolinon, poste la ĉefurbon Raleigh, Kabon Hatteras kaj finfine NASK-on — oportuna sistemo por turismi kaj eniri en la rondon de Esperanto. Finfine tamen ne estis tiel.

NASK, Nord-Amerika

Somera Kursaro pri Esperanto, okazis ĉi-jare en la Universitato William Peace, en Raleigh, malnova altlernejo en ĉarma parko animata per la kantado



Minjo Renaud kaj Francisko Lorrain farante intervjuon kadre de usona Esperanto-kongreso

de cikadoj, kun vivoplenaj plantoj, komfortaj ĉambroj kaj afablaj homoj.

Per la reto, mi estis elektinta la bazan nivelon, sed, babilante dum la vespero, mi decidis transiri al la meza nivelo. Jam la unuan tagon, mi ekkonsciis, ke ne temas pri feriado. Male, estas intensaj kursoj dum la

mateno, kaj farendaj taskoj dum la posttagmezo. Nenia rigideco, sed reguleco, kiu subtenas la laboron, tra diversaj aktivecoj — legado, kantado,

ludoj, vizitoj kaj interŝanĝoj pri niaj vivspertoj, ĉiam en agrabla etoso. La studado estis prisemita de kelkaj aventuroj, kiuj stimulis min trovi mian propran motivaron.

La kadro estis favora, kaj la personoj, kun aparta kora kvalito, puŝis min ekster la pozicion de la eterna komencanto. Koincide, dum la posta, samloka kongreso de Esperanto-USA, prelegis Orlando Raola pri la temo « Por ne plu esti eterna komencanto »!

Jen poemo, kiu multe inspiras min.

*Mi ĵuras ne lasi  
la malamon senhonorigi mian animon,  
sed disponigas min humile  
kiel gardanton de naturo,  
resanigiston de mizero,  
kurieron de mirado,  
arkitekton de paco.*

(El la poemo “School Prayer” [Lerneja preĝo]  
de Diane Ackerman)

Tiuj vortoj tute respondas al la ideo, kiun mi havas pri Esperanto, kiam ĉirkaŭ mi kolero tondras kaj timo furiozigas la korojn. Kion fari rilate la situacion en Sirio, hodiaŭ komence de septembro 2013 ? Mia laboro nur komenciĝas.



## NASK-2014 en Kanado ! Jes !

Ne, vi ne mislegis ! Jen la unua fojo en pli ol 40-jara historio de NASK, kiam ĝi venos al Kanado ! Ĝi okazos inter la 29-a de junio kaj 8-a de julio 2014 en belega urbo Viktorio (Brita Kolumbio). Tuj poste kaj samloke okazos komuna usona/kanada landa kongreso. Pli da informoj baldaŭ haveblas ĉe [esperantic.org](http://esperantic.org) (pri NASK) kaj [esperanto-usa.org](http://esperanto-usa.org) (landa kongreso). Iom da stipendia mono haveblas de NASK kaj, por kanadanoj, ankaŭ de la eduka fonduso de KEA (kien, cetere, eblas ankaŭ fari impost-dedukteblan donacon por edukaj iniciatoj en Kanado, kiel la ĉi-jara NASK). Kontaktu Geoffrey Greatrex [greatrex \[ĉe\] uottawa.ca](mailto:greatrex@uottawa.ca).



# Post-NASK-a kongreso en Nord-Karolino

*Francisko Lorrain*

*Le congrès annuel d'Esperanto-USA s'est tenu aussitôt après le cours d'espéranto NASK, au même endroit, à Raleigh, en Caroline du Nord. Plusieurs participants de NASK, restés pour le congrès, y ont apporté leur enthousiasme. Assemblées, présentations variées, excursions — tous les ingrédients essentiels d'un congrès étaient au rendez-vous. À souligner : la présentation émouvante d'un jeune Coréen, parlant très couramment l'espéranto, qui a passé deux années au Liban comme membre des troupes coréennes de maintien de la paix de l'ONU.*

Tuj post la [Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto](#) (NASK), priskribata en najbara artikolo de Minjo Renaud, ni partoprenis, samuniversitate, en la jara kongreso de Esperanto-USA. Tiu kongreso similis al multaj tiaj Esperanto-aranĝoj :



Universitato William Peace

interkonatiĝa vespero, prelegoj, libroservo, ekskursoj, bankedo, solenaj malfermo kaj fermo... Sed la ĉeesto de pluraj kaj entuziasmaj NASK-anoj diverslandaj, kiuj elektis tiel daŭrigi sian restadon en Esperantujo, senteble vigligis la kongresan etoson.

La prelegoj estis tre diversaj. Mi mencias nur kelkajn, kiujn mi ĉeestis, aŭ pri kies enhavo mi iom eksciis.

Joel kaj Ĵenja Amis priskribis sian memorindan vojaĝon al Japanujo, pri kiu la legantoj de *La Riverego* jam scias ĉion.

Walter Murawski klerigis nin pri la grava dana astronomo [Tycho Brahe](#) (1546–1601), la ruinojn de kies observatorio li vizitis sur la insulo Ven en Danujo.

La juna Koreo Kim Young-Long, NASK-ano kaj lerta esperanto-parolanto, kortuŝe prezentis sian dujaran restadon en Libano, kiel ano de la tiea korea UN-pacfluga taĉmento.

Alia partoprenanto, kies nomon mi bedaŭrinde ne sukcesis trovi, priskribis al ni sian viziton de la tiel nomata *Maison sublime* [sublima domo],

malkovrita en la franca urbo Rouen en 1976, sub la korto de la Justica Palaco. Ĝi estas 12a-jarcenta konstruaĵo, kiu laŭ iuj estus jeŝivo, t.e. juda religia lernejo, laŭ aliaj privata rezidejo de juda familio. Ĝi estas la plej malnova juda monumento en Francujo.

Iu, kiun mi ne volas nomi ☺, invitis al mensa “Ekskurso tra vakuo kaj malfinio” — tiel, kiel konceptas ilin la hodiaŭaj matematikistoj.

Sufiĉe variaj kaj interesaj temoj, ĉu ne ?

Aldone, kiel ĉiujare, samtempe kaj samloke okazis

estrarkunveno de Esperantic Studies Foundation (ESF) — grava usona fondaĵo, kiu de jaroj subvencias NASK-on, la paĝarojn [lernu!](#) kaj [edukado.net](#), la [Nitobe-simpoziojn](#), ktp. Estis interese povi renkonti la ESF-estraranojn kaj paroli kun ili.



Partoprenantoj de la kongreso



# Mia dua Universala Kongreso

*Marteno Benoit*

*Martin Benoit et Yvan-Denys Cloutier ont participé au congrès mondial d'espéranto qui s'est déroulé à Reykjavik, en Islande. Martin décrit son expérience du congrès et de ce splendide pays !*



**2011 en Kopenhago : eksciinte pri la okazonta UK en Rejkjaviko, Islando, mi tuj eksentis la deziron partopreni tiun ĉi kongreson. De antaŭ multaj jaroj mi revis viziti la landon, kies ĉefurbo estas la plej norda en la mondo !**

Mia koramiko Yvan-Denys decidis akompani min, eĉ se lia Esperanto estas minimuma. Ni flugis de Montrealo al Rejkjaviko kun aviadilŝanĝo en Bostono. Pro la horzona ŝanĝiĝo ni dormetis du horojn en nia hotelĉambro antaŭ ol daŭrigi la

ceteron de la tago, kiu estas tre longa tie : la suno subiris je la 23-a vespere ! Ni ricevis inviton de Hari Barron, Esperantisto el Kimrio, por iri al la varma banejo de Laugardalslaug, kun Elizabet de Germanio kaj ŝia edzo. La pluraj varmaj banejoj kaj naĝejoj kun malsamaj temperaturoj estis vere plaĉaj ! Unu baseno enhavis akvon ĝis 44 gradojn ! Mi ne povis elteni, sed mia koramiko ja ŝategis ! Kaj, kompreneble, ni ludis glitante en la sufiĉe alta glittubo !

Ni noktumis en geja drinkejo, *Kiki Bar*, kie ni renkontis aliajn Esperantistojn : Francis el Francio, Didier el Francio, Jens el Germanio, Marko el Italio, Randy kaj Jeff el Atlanto, Jeremio kaj Jogo el Toronto kaj kelkaj aliaj !

Ni dimanĉe spektis la tradician solenan malfermon (en la belega kongresejo Harpa), kiun eĉ la islanda prezidento ĉeestis kaj kie li paroladis islande kun posta Esperanta traduko de Siru Laine. Pli ol 50 landoj salutis la mil kongresanojn, kaj ni eksciis, ke la 100-a UK okazos en Lille, Francio, en 2015. Kaj je la fino ni kunkantis la Esperantan himnon *La Espero*.

Dum la nacia vespero ni ekkonatiĝis kun la riĉa islanda kulturo : batalo inter Vikingoj ; kanto de poemoj islande kaj Esperante ; teatraĵeto pri tri islandaj dioj, kies islandaj aktoroj parkerigis la Esperantan tekston ; demonstro de islanda luktarto *glima* ; kaj islanda muzikgrupo, kies muziko inspiriĝis de la Balkanoj.

Ni elektis la 12-horan ekskurson al okcidenta Islando. La pejzaĝoj estis nepriskribeblaj : multegaj ebenaj kaj altaj montoj, vulkanoj, salmaj riveroj, dometoj, ŝafoj, ĉevaloj, bovinoj, ktp. Ni



Yvan-Denys Cloutier  
kaj Martin Benoit

busiris de Rejkjaviko, haltante en la urbeto Borgarnes, trapasinte la 6-kilometran tunelon sub la fjordo Hvalfjörður. La grupo enŝipiĝis en urbeto Stykkishólmur por vidi la famajn islandajn birdojn, la

fraterkulojn. Reveninte de la krozo, ni tagmanĝis islandkuirarte en bonega restoracio. Poste ni vizitis la vastajn akvofalojn Hraunfossar kaj la varmakvan fonton Deildartunguhver, el kiu eliras bolanta akvo. Fakte, la varma akvo en tiu ĉi regiono devenas de ĝuste tiu fonto ; oni pasigas la akvon per tuboj laŭ la longo de pluraj kilometroj, kaj la domoj ricevas varmegan akvon je 75°.

Ĉar ni ricevis malmultan informon dum la Esperanta ekskurso, pro la limigita tradukkapablo de la alesperanta tradukisto, kaj ĉar ni ne vidis la



famajn gejserojn, ni decidis aĉeti anglalingvan privatan ekskurson *Ora Cirklo*. Ni vizitis la nacian parkon Þingvellir, kie oni povas vidi la tektonikan fendegon inter Eŭropo kaj Nord-Ameriko, belegajn pejzaĝojn kun la plej granda lago de Islando kaj la proksimaj montoj. Due ni vizitis la akvofalegon Gullfoss (ora akvofalo), kiu akceptis nin kun bela ĉielarko ! Kaj trie ni vidis la gejserejon Geysir ! (*Geysir, aŭ La Granda Geysir, fakte, donis al ni la vorton « gejsero », kiu signifas « ŝprucegi ».* *Geysir povas ŝprucegi la akvon ĝis 70 metrojn alte, sed lastatempe ĝi erupcias tre malofte, foje ĝi ne faras tion eĉ dum kelkaj jaroj. — Red.*). La gejsero, kiu erupcias plej ofte, estas Stokkur : ĝi ŝprucas akvon ĉiun 4-6-an minuton, je 30 metroj. Vere surpriziga kaj mirinda natura fenomeno ! Post la ŝprucoj restas sufiĉe fetora sulfuraodoro.



La Granda Geysir



La gejsero Stokkur



La akvofalego Gullfoss

Dum la kongreso ni ĉeestis kelkajn prelegojn kaj spektaklojn. Mia koramiko partoprenis la komencantan kurson, dum mi aŭskultis prelegojn pri Esperanto ĉe Interreto, [lernu!](#), klimatsanĝoj en Islando, ktp. Ni spektis la bonegan kaj dolĉan spektaklon de Ĵomart kaj Nataŝa. Ni ankaŭ iris al la islanda kurso de Siru Laine : *Góðan daginn !* (Bonan tagon !), *Ég tala frönsku og Esperanto* (Mi parolas la francan kaj Esperanton), *Mér finnst rigninginn góð* (Al mi plaĉas pluvo), *Eyjaflallajökull* (Insula Monta Glaĉero).

Vendredo estis nia lasta kongresa tago, ĉar ni devis sabate frumatene vekiĝi por elflugi de Rejkjaviko, kaj ni maltrafis la solenan fermon. Ni spektis duhoman teatraĵon en Esperanto, *Ne lasu min sola*, kaj la tradician

internacian artan vesperon. Multaj talentoj partoprenis en la spektaklo, kiel Francis de Francio, kiu kantis estonan kanzonon de Eurovision, kiun li tradukis Esperanten. Kia bela voĉo ! Kaj fine, la fama internacia koruso, kiu interpretis la Eŭropan Himnon. Post tio ni devis emocie kaj brakume ĝisi niajn malnovajn kaj novajn amikojn.

Islando kaj la kongreso estis por ni ambaŭ belega kaj plaĉega sperto. Mi retrovis amikojn tie, ni renkontis novajn amikojn, mia koramiko konatiĝis kaj entuzismiĝis pri nia lingvo, ĝiaj kulturo kaj humanismaj valoroj. Pluraj amikoj defiis Yvan-Denys paroli flue en la kongreso de Lille en 2015 ! Ni do plej verŝajne kongresos tie ! ☺

**P.S.** Mi aŭdis, ke Esperanto-USA ŝatus organizi UK-on en 2016, sed pluraj homoj ne kapablos atingi Usonon pro vizo-malpermesoj. Ĉu Montrealo ? Mi aŭdis plurajn, kiuj ŝatus, ke estu Montrealo !



## Venontjare: brazila IJK, argentina UK

En 2014 la IJK (Internacia Junulara Kongreso) okazos en la urbo Fortaleza, sur la nord-orienta marbordo de Brazilo. Ĝi daŭros de la 18-a de julio 2014, ĝis la 25-a. La IJK estas ĉiujara kongreso de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Vi ricevos pliajn informojn spektante la videon ĉe <http://youtu.be/DyQYNj7PJJ4>, faritan de Fabio Monteiro, brazila ĵurnalisto, vigla filmisto kaj Esperantisto.

Tuj poste okazos la UK (Universala Kongreso de Esperanto), en Bonaero, ĉefurbo de Argentino, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Informoj troveblas ĉe [http://www.uea.org/kongresoj/uk\\_2014.html](http://www.uea.org/kongresoj/uk_2014.html)







Nitobe-simpozio 2013 :

## Anglalingva instruado en neanglalingvaj universitatoj



Disvastiĝo de la angla kiel instrulingvo en pluraj landoj de la mondo estis la temo de la ĉi-jara Nitobe-simpozio, kiu okazis de la 18-a ĝis 20-a de julio 2013 en Rejkjaviko, Islando. La lastaj jaroj estas markitaj per sentebla kresko de la kvanto de kursoj kaj programoj, aparte je la magistra nivelo, instruataj ĉu, tute ĉu parte en la angla — la respondo al la grandiganta movebleco de studentoj kaj la kreskanta intereso de universitatoj pri internaciaj pritaksoj, kio igas diversajn tipojn de universitatoj tra la mondo konkurenci por rimedoj, ĉefe esplorsubvencioj, kaj por altigi nacian kaj internacian prestiĝon.

La simpozio, kiun organizis la Centro de Esploro kaj



**Nitobe Inazoo estis japana doktoro pri agrikulturo, edukisto, Vic-Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj kaj fervora simpatianto de Esperanto, kiu partoprenis la 13-an UK en 1921 en Prago.**

Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kunigis tre diversecan grupon de 40 invititaj specialistoj pri supera edukado el 23 landoj, ekde Usono, Kanado, Irlando kaj Britio, ĝis Ĉinio, Japanio, Ĉilio, Meksiko, Kipro, Kazaĥio, Azerbajĝano kaj Hinda Unio. La nordiaj landoj (Finnlando, Svedio, Danio, Norvegio kaj Islando) estis aparte bone reprezentitaj. La aperigota libro, *English in Nordic Universities : Ideology and Practice*, redaktita de Anna Kristina Hultgren, Frans Gregersen kaj Jacob Thøgersen, eldonota de John Benjamins, Amsterdamo, estis la tuja inspiro por la simpozio.

Festparoladojn faris Rainer Enrique Hamel (Meksiko), Michele Gazzola (Germanio/Italio) kaj F. Xavier Vila (Katalunio, Hispanio).

« Dum la uzo de ununura lingvo en supera edukado evidente faciligas la fluon de informo internacie, ĝi privilegias iujn homojn kaj malavantaĝigas aliajn, kaj ofte ĝin antaŭenigas akademia prestiĝo, pli ol akademia elstareco », komentis Humphrey Tonkin (Usono), unu el la organizintoj de la simpozio. « Ĝi ankaŭ erozias la kapablon de naciaj kaj lokaj sciencaj kulturoj rilati kun la lokanoj, inkluzive gejunulojn », li aldonis. Estas urĝa bezono trovi aliajn, multlingvajn solvojn, li sugestis.

La simpozion, kiu okazis en la Islanda Nacia Muzeo, financis ESF (Esperantic Studies Foundation), kun aldona subteno de la eldonejo John Benjamins. La simpozio okazis sub la aŭspicioj de la Instituto Árni Magnusson por Islandaj Studoj, la Konsilio de la Islanda Lingvo, kaj la Instituto Vigdis Finnbogadóttir por Fremdaj Lingvoj. Ari Páll Kristinsson, de la Instituto Árni Magnusson, prizorgis lokan organizadon.

La Nitobe-seminarioj estas nomitaj honore al Nitobe Inazo (1862-1933), japana diplomato de la 1920-aj jaroj kiu pioniris la serĉon por internacia lingva interkompreno.

Ĉiuj materialoj de Nitobe-simpozio alireblas ĉe <http://esperantic.org/en/nitobe>

[esperantic.org]

## Premio Deguĉi al Lernu.net

**Premio Onisaburo Deguĉi, « la esperantista pacpremio », estis starigita per donaco de Oomoto en 1987, la Jubilea Jaro de Esperanto, kaj estis aljuĝita ĉiujare ekde tiam. La Premio konsistas el monsumo de 2000 eŭroj kaj el diplomo.**

Laŭ sia regularo la Premio Deguĉi estas asignata « pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de d-ro Zamenhof kaj al instruoj de Onisaburo Deguĉi, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj ».

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2013 estis aljuĝita al la reta projekto lernu.net.

La retejo lernu.net estis lanĉita en decembro 2002. Ekde tiam amaso da homoj lernis Esperanton per la modernaj retaj rimedoj, kiujn ĝi ofertas. Jam preskaŭ 150 000 homoj ĉie en la mondo estas registritaj kiel ĝiaj uzantoj.

[Laŭ gazetara komuniko de UEA]



## La lasta ŝanco akiri la DVD-on de *La Universala Lingvo* duonpreze!

Restas malmulte da tempo por aĉeti la filmon *La Universala Lingvo* de oskar-nomumita reĝisoro Sam Green! La speciala oferto — du diskoj je la kosto de unu : 20 USD — finiĝos la unuan de oktobro. Rapidu aĉeti la diskon por via persona kolekto kaj donacu la alian al via biblioteko, lernejo aŭ amiko!

*La Universala Lingvo* estas 30-minuta dokumentfilmo produktita kun la financa subteno de ESF, kiu debutis en 2011 en la festivalo Sundance kaj ricevis tre bonajn reagojn de la publiko. Ĝi prezentas la historion kaj la nuntempon de Esperanto vidata per la okuloj de neesperantisto. La filmo spuras la historion de Esperanto kaj estas samtempe portreto de la hodiaŭa Esperanto-movado, en kiu la reĝisoro kunplektas intervjuojn filmitajn dum pluraj lastatempaj Universalaj Kongresoj kun trezoro de neniam viditaj arĥivaj bildoj pri Zamenhof kaj la frua Esperanto-movado. « Li kapablas diri la veron bele », skribis Renato Corsetti pri Sam Green en



recenzo pri la filmo (<http://www.esperanto.qc.ca/files/riverego/Riverego112.pdf>). « Li kapablas artisme prezenti aferojn, kiuj tuj iĝas tedaj, se mi provas klarigi ilin per punktoj kaj subpunktoj. Pro tio la filmo *La Universala Lingvo* prezentas la veron pri Esperanto en tre alloga maniero », notas

Corsetti. Corsetti opinias, ke la filmo *La Universala Lingvo* povas konvinki homojn lerni Esperanton pli ol aliaj verbaj materialoj, kiujn esperantistoj produktis kaj produktas : « Ĝi estas realisma (ekzemple pri la rolo de la angla lingvo), sed puŝas homojn aliĝi al la 'plibonigantoj de la mondo pro la plezuro plibonigi la mondon' ».

**Elĉerpaĵo de la filmo** (en la angla, kun Esperantaj subtitoloj) spekteblas ĉe : <http://youtu.be/HL7QtDt4tI>

**La disko aĉeteblas ĉe :** [www.esperantodocumentary.com](http://www.esperantodocumentary.com). La filmo mem estas en la angla, sed estas subtitoloj en 19 lingvoj.

## *Bonan feston, Tamara !*

Jam pasis preskaŭ tri jaroj, ekde kiam mia edzo kaj mi translokiĝis al Montrealo de Usono, kaj ni ne bedaŭras nian decidon por unu momento : ni eĉ ne povis imagi, kiom da esperantistaj amikoj ni havos ! Mi iam skribis, ke « dank' al esperantistoj ni sentas nin hejme », kaj tio estis vera antaŭe kaj nun. Fakte, ni eble eĉ fariĝis tro tipaj montrealanoj, kiuj preskaŭ neniam vizitas aliajn partojn de provinco ! Ĝuste pro tio la invito de Tamara Koziej al sia 50-jara jubileo estis por ni la kialo ne nur viziti mian amikino kaj antaŭan najbarino (Tamara venas de Pollando, dum mi de la najbara Ukrainio) kaj ŝian entreprenon, kies specialaĵo estas manĝeblaj floroj kaj kiu, cetere, portas Esperantan nomon : *Arboflora*, sed ankaŭ vidi la pli nordan parton de la provinco, la belan regionon Saguenay, kiu situas je proksimume kvinhora ŝofor-distanco de Montrealo. Dancoj « biodanza » kun profesia dancistino, muziko, desegnado, bongustega vegetara manĝaĵo kaj mirtela vino, kaj kompreneble, la famaj manĝeblaj floroj de Tamara estis neforgeseblaj.

Nome de ĉiuj legantoj de La Riverego, ni salutas kaj bondeziras al Tamara feliĉan 50-jaran datrevenon !

Ĵenja Amis





## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

Vendredo 27-a de septembro 2013, 18 h*	MEDO : haitia manĝo (alportu ion !)
Vendredo 11-a de oktobro 2013, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 25-a de oktobro 2013, 19:30 h	MEDO : halovena festeto (portu dolĉaĵo aŭ vestiĝu, laŭvole)
Vendredo 8-a de novembro 2013, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 29-a de novembro 2013, 19:30 h	MEDO
Sabato 14-a de decembro 2013	154-a datreveno de Zamenhof (detaloj en la retejo: <a href="http://esperanto.qc.ca">esperanto.qc.ca</a> )
Vendredo 10-a de januaro 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 24-a de januaro 2014, 18 h*	Bretonia manĝo : 3776 Mentana (angule de Roy), metroo Sherbrooke
Vendredo 14-a de februaro 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 28-a de februaro 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 14-a de marto 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Sabato 29-a de marto 2014	Acerejo apud Tririvero (detaloj en la retejo: <a href="http://esperanto.qc.ca">esperanto.qc.ca</a> )
Vendredo 11-a de aprilo 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 25-a de aprilo 2014, 19:30 h	MEDO
Vendredo 9-a de majo 2014, 18 h*	Commensal (sube)
Vendredo 23-a de majo 2014, 19:30 h	MEDO

**Junio** 13-a: MEDO, 27-a: Commensal ; **julio-aŭgusto** : ferioj ; **septembro** 12-a: Commensal ; 26-a : MEDO (itala manĝo) ; **oktobro** 10-a : Commensal, 14-a : MEDO; **novembro** 14-a Commensal ; 28-a : MEDO; **decembro** 13-a : jarfina / Zamenhof-festo

\* Noto : manĝo je la 18 h , babilado ekde 19 h 30. Por temaj vesperoj kun manĝoj vi povas alporti ion kaj veni je la 18:00 aŭ vi povas veni simple por babili je la 19:30.

**Commensal St-Denis (restaurant végétarien / flexitarien )** : 1720, rue St-Denis (entre de Maisonneuve et Ontario, métro « Berri-UQAM »). **MEDO (Montreala Esperanto-Domo)** : 6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8

# Esperanto-renkontiĝoj

12-14-a de oktobro : 20-a ARE (Silver Bay, Lake George)

Novjorkio, Usono

17-19-a de majo 2014 : 11-a MEKARO

Sherbrooke, Kebekio

29-a de junio — 7-a de julio 2014 : NASK

Viktorio, Kanado

julio 2014 (*detaloj: esperanto-usa.org*) : usona/kanada landa kongreso

Viktorio, Kanado

18-25-a de julio 2014 : 70-a IJK

Fortaleza, Brazilo

26-a de julio — 2-a de aŭgusto 2014: UK

Bonaero, Argentino

16-18-a de majo 2015: 12-a MEKARO

Toronto, Ontario

25-a de Julio — 1-a de aŭgusto 2015 : 100-a UK

Lille, Francio

21-23-a de majo 2016: 13-a MEKARO

Granby, Kebekio

*provizore: 15-a MEKARO (2018) : Montrealo (Kebekio)*

## Renkontu la novan estraron de ESK !

*(de maldekstre dekstren)*

- Sylvain Auclair (sekretario-kasisto)
- Normand Fleury (prezidanto)
- Suzanne Roy (vic-prezidanto)
- Nicolas Viau (konsilanto)
- Joel Amis (konsilanto)





# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto


La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya Amis (riverego(ce)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair kaj Francisko Lorrain. **Estraranoj de ESK** : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Nicolas Viau (konsilanto), Joel Amis (konsilanto).


La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair et François Lorrain. **Administrateurs de la SQE** : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Nicolas Viau (conseiller), Joel Amis (conseiller).

**Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2013.11.20**  
**6358, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**




En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca



**Vizitu nian retejon !**  
**Visitez notre site web !**  
[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)

## Pasporta Servo



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :  
[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org).  
Vi povas ankaŭ kontakti  
Ĵenja Amis  
(yevgeniya.amis(ĉe)gmail.com), kiu estas la peranto por Kanado.

